

# Espero Katolika



En 2011 la kongresanoj de IKUE estis je la "centro de la mondo"

**Numero 7-9/2011**

**Julio-Septembro 2011**



**Sur la kovrilo:** *En Kroatio urbo Ludberg estas konsiderata la centro de la Mondo, kaj la kongresanoj de nia ĉi-jara kongreso staris ĉirkaŭ la bronza ronda plato centre de la placo, kiu indikas tiun centron.*

## ENHAVO

### LA IKUE-KONGRESO 2011 "NIA 64a"

En **Zagrebo** ni kongresis sub ombro de la katedralo 43

### BIBLIAJ TAGOJ EN WERL

**Raporto** pri tre sukcesa aranĝo 47

Omaĝe al Pastro **Lajos Kóbor** en la 50-jara datreveno de lia pastrigo 50

### MAJA IKUE-RENKONTIĜO EN NITRA

Rekomenciĝis en **Slovakio** la tradicia dulanda kunveno 51

**NOVA ELDONAĴO** 53

### ĈU DEMOKRATIO AŬ IO ALIA?

Prelego 54

### FUNEBRE

3 gefratoj forpasis en junio: Krystyna Macińska, Pastro Roman Forycki 57

kaj Jacques Tuinder 58

- *liaj bonfaraj aktivadoj E3 kaj Evidente* 59

- *rememoroj de la IKUE-prezidanto pri li* 60

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* Dissendolisto: <ikue@yahoogroups.com>

UEA-konto "ikue-v" \* Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondeca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Švábek - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Generala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Sac. Stefano Hawkes-Teeple - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

## NI KONGRESIS SUB OMBRO DE LA KATEDRALO

La pasintjara 63-a Kongreso de IKUE okazis tuŝapude, do sub la ombro de la fama Baziliko de Sankta Koro en Montmartre en Parizo. La nunjara 64-a Kongreso de IKUE okazis dum la tagoj de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2011 tuŝapude, do sub la ombro de la Katedralo de la Ĉielenpreno de la Virgulino Maria kaj sanktaj Stefano kaj Ladislao. La kongreso okazis en Supera Porpastra Seminario kaj la Ĉefdioceza Pastoralo Instituto. La temo de la kongreso estis: “Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos” (Luk 21, 17-18).


Malgraŭ tio, ke la kongreson ne ĉeestis multnombra partoprenantaro, ĝi estis tre sukcesa kaj spirite riĉa, sperte organizata



*Malantaŭ kolono de la Virgulino Maria, apud rempara rotondo estas Alta Dioceza Seminario, kie okazis la kongreso*

fare de la vicprezidentino de IKUE fratino Marija Beloŝević, loĝanta en la kongresurbo. Certe bedaŭri sian neĉeeston prave povas tiuj, kiuj povinte ĝin ĉeesti, tamen rezignis pri ĝi.

La programo de la nunjara kongreso estis iom nekutima pro partopreno de multaj eksteraj prelegantoj. Malavantaĝo de tio estis necesa esperantlingva tradukado de iliaj prelegoj, kio konsumis kroman tempon, sed tiu ĉi malavantaĝo estis kompensita per interese riĉenhavaj prelegoj, kaj al la gravpostenaj prelegantoj tio montris utilecon de Esperanto kaj mal-



*Urboparto Kaptol en Zagrebo kun dominantata katedralo estas la plej grava centro de la urbo, apud kiu okazis la kongreso fermitacon de IKUE.*

La jam menciita Supera Porpastra Seminario, en kiu okazis la kongreso, estis fondita en la jaro 1563. Ĝia kompleta renovigo kaj interne kaj ekstere estis realigita inter la jaroj 2005 kaj 2007.

Antaŭ la dimanĉa posttagmeza inaŭguro de la kongreso okazis antaŭe trarigardo de la katedralo, en kiu la kongresanojn bonvenigis tiea rektoro. Poste sek-



*La solenan malfermon de la kongreso ĉeestis zagreba helpepiskopo Mons. Ivan Ŝaŝko, alparolinta la kongresanojn*

vis en la katedralo rozaria preĝo ĉe la tombo de la beata Alojzije Stepinac kaj la inaŭgura sankta meso, kies ĉefcelebranto estis pastro Lajos Kóbor



*Prelegas skoltino Nikolina Delaš*

el Hungario. La sankta meso estis ankaŭ dankesprimio por 50-jara datreveno de lia sacerdotiĝo. Poste sekvis en la kongresejo solena inaŭguro de la kongreso. La kongresanojn nome de zagreba diocezo salutis help episkopo Mons. Ivan Šaško, kiu ĉeestis ankaŭ la sekvajn alparolojn aŭ prelegojn de la reprezentantoj de la katolikaj asocioj kaj movadoj. Sed jam matene okazis interesa prelego de emerita profesoro Ivan Golub pri *“Kardinalo Ratzinger povus esti papo. Bona Papo. Memoroj kaj antaŭsentoj.”* Al inaŭgura posttagmezo per siaj paroladoj kontribuis Prof. Branko Korbar, prezidanto de la Kroata Katolika Unuiĝo de Instruistoj pri *“Katolikaj edukistoj dum la komunista*



*Prelegas emerita profesoro Ivan Golub*

*periodo”*, Đurđa Arbutina el Franciskana tria sekulara ordeno pri *“Spirito de Asizo, 25 jaroj”*, Prof. Jelica Stipaničev Mustapić el Kroata unuiĝo de la katolikaj flegistinoj kaj medicinaj teknikistoj pri *“Sano, malsano, sufero en la mesaĝoj de la beata Johano Paŭlo la Dua”*, Nikolina Delaš el Unuiĝo de la katolikaj skoltoj Jarmina pri *“Skoltismo – vojo al dialogo kaj interkompreniĝo”*, Miloslav Šváček, prezid. de IKUE pri *“Atesto pri persekutado en iama Ĉeĥoslovakio”*, sekvis bildprezento pri *Martireco de s-ta Maksimiliano Maria Kolbe* kaj fine la programo de muzikgrupo *“RiM”*.



*Ĉefcelebranto en Ludbreg estas episkopa vikario Mons. Ivan Godina. Suraltare estas relikvujo kun mirakle akirita Sango de Kristo*

Lunde okazis tuttaga pilgrimo al Ludbreg, kie okazis sankta meso en paroĥa preĝejo, kies ĉefcelebranto estis episkopa vikario Ivan Godina. Poste kune kun li okazis vizito de proksima kapelo kun lia parolado.

Post Ludbreg okazis vizito de Maria-poli en Križevci – la urbeto kun regiona centro de la Fokolarmovado, vizito de grekkatolika katedralo kaj vizito de romkatolika katedralo.

Kaj lasta halto estis en Vrbovec, kie okazis vizito de Komunumo Cenacolo, en kiu sin liberigas de la drogkonsumado 50 junuloj. Kortuŝa estis atestado pri ilia malĝoja pasinteco. Kaj kortuŝa estis





*Parto de la kongresanoj antaŭ kapelo en Ludbreg*

komuna rozaria preĝo dumpromene en la naturo kaj komuna kun ili vespermanĝo.

Tre kortuŝa ankaŭ estis la marda matena rozaria preĝo antaŭ bildo de Patrino de Ŝtonpordo, patronino de Zagrebo. Antaŭtagmeze okazis Ĝenerala Kunveno de IKUE, kiu kromalie ankaŭ aprobis kandidatojn por estraro de IKUE kaj prezidanta funkcio por plua kvarjara balotperiodo. Posttagmeze okazis pilgrimo al Krašić kun sankta meso en tiea preĝejo de Sankta Triunuo kaj kun vizito de memorĉambro, en kiu mortis beata martiro Kardinalo Alojzije Stepinac.



*Beata martiro Kardinalo Alojzije Stepinac*

Post longa veturo en montara regiono ni atingis lokon Stojdraga kun vizito de grek-katolika preĝejo de s-ta Georgo kaj loka muzeo. Tie ni ankaŭ agrable subĉiele vespermanĝis.

Por pluj prelegoj estis dediĉita merkreda tago, en kiu okazis prelego de Prof. D-ro Božidar Nagy, profesoro ĉe Filologia Fakultato de la Kompanio de Jesuo pri *“Interreligia dialogo en la dokumentoj de la katolika eklezio”* kaj *“La beata Ivan Merz”*.



*Interno de grekkatolika preĝejo en Stojdraga*

Post li prelegis frato Pavol Petrík el Slovakio pri *“Persekutado de la Grek-katolika Eklezio en Slovakio dum komunisma reĝimo kun speciala atento pri beataj martiroj Peter Pavol Gojdič kaj Vasil Hopko”*.

Fratino Marina Stepanĉeva el Rusio prelegis pri *“Katolikoj en Rusio”*.

Kaj ankaŭ okazis pere de skajpo prelego de estrarano de IKUE Mons. Gabriel Anda el Kamerunio en Afriko, direktoro



*Ĉiam gaja kaj spritema ĝenerala sekretario de IKUE frato Carlo Sarandrea kun laŭrokrono*



*Prelegas episkopo Mons. Vlado Košić*



*Sabata adiaŭo kun italaj kongresanoj*

de tiea Radio Maria pri “*Evangelizado per komunikiloj: ekzemplo de la Radio Maria en Kamerunio*”.

Ĵaŭde matene okazis prelego de Sac. Tomislav Glavnik, OFMConv., eksperto pri kanona juro ĉe Papa Universitato de la Sankta Koro en Romo pri “*Privataj laikaj organizoj en Eklezio*”.

Sekvis la prelego de diakono Janos Kirsch pri “*Hungaraj martiroj de la 20-a jarcento*”.

Novpastro Dario Paviša prelegis pri “*Kroatoj, kies procedoj por esti rekonataj kiel beatuloj kaj sanktuloj estas traktataj*”. En la kapelo li post tio donadis al la kongresanoj novpastran benon.

Posttagmeze Miloslav Šváček projekciis prezentaĵojn pri la pasintjara 63-a Kongreso de IKUE en Parizo kaj Bibliaj Tagoj 2011 en germana urbo Werl. Frato Carlo Sarandrea, ĝenerala sekretario de IKUE okazigis interretan kurseton.

Post tio okazis vizito de Baziliko de la Plejsankta Koro de Jesuo, kie ni preĝis rozarion ĉe la tombo de beata Ivan Merz. Kaj vespere okazis amuzprogramo.

Vendrede realiĝis tuttaga pilgrimo al diocezo Sisak. Ĉefcelebranto en la katedralo estis episkopo Mons. Vlado Košić, kiu poste prelegis pri “*Martiroj de la diocezo Sisak ekde s-ta Kvirin ĝis niaj tagoj*”. Post komuna tagmanĝo la episkopo akompanis nin dum vizito al kelkaj urboj en lia diocezo.

Nu kaj sabate post rozaria preĝo kaj sankta meso en la seminaria kapelo de la Plejsankta Koro de Jesuo kaj matenmanĝo finiĝis la 64-a Kongreso de IKUE. Speciala danko apartenas al ĝia ĉefaranĝantino vicprezidantino de IKUE Marija Belošević kaj al ĉiuj, kiuj iamaniere kontribuis al la sukceso de la kongreso kaj kadre de ĝi al spirite riĉa programo.

Danke al Dio kaj la aferemaj aranĝantoj okazis bela kogreso en Zagrebo. Ni esperu revidi nin denove venontjare en la IKUE-kongreso. Do ĝis la revido!

*Miloslav Šváček*

## BIBLIAJ TAGOJ EN WERL – TRE SUKCESA ARANĜO

En la tagoj de la 2-a ĝis la 6-a de marto okazis en Germanio en urbo Werl Bibliaj Tagoj por esperantistoj, kiuj havas en Germanio jam pli longan tradicion. Por nunjaraj Bibliaj Tagoj estis elektita ne-granda urbo Werl kun 30 mil enloĝantoj, sed kun belega katolika pilgrim-baziliko de la Virgulino Maria kaj paroĥa preĝejo de sankta Walburga, evangeliana preĝejo



*Minora Baziliko en Werl, kie estas honorataj gracaj kruco kaj statuo de Dipatrino Maria kun Jesueto. Dekstre malnova malnovgotika pilgrima preĝejo.*



*Werl - iama Collegium Aloisianum, kie okazis la Bibliaj Tagoj*

kaj du muzeoj. Organizado de la Bibliaj Tagoj transprenis nia IKUE-frato **Stefan Lepping**, de la partoprenintoj de la 19-a Ekumena E-kongreso en Vroclavo 2009



*Ĉeforganizanto frato Stefan Lepping*





kaj la 63-a IKUE-kongreso en Parizo 2010 bone konata profesia muzikisto. La aranĝo okazis en iama “Collegium Aloisianum (Konvikto) konstruita ĝis la jaro 1921 kiel loĝejo por lernantoj eksterurbaj de la Werl-a gimnazio Marianum. Tiam Werl havis nur 7 mil enloĝantojn. La Konvikto estis episkopa eklezia domo por edukado, ankaŭ rigarde al vokiĝoj al pastreco. En 60-aj jaroj ĝi estis pli-



*Bibliajn prelegojn realigis benediktana monaĥo sac. Willibald Kuhnigk OSB*

grandigita. Kiel lernejo ĝi funkciis ĝis la jaro 2005, kiam ĝi fariĝis sidejo de kristana privata projekto. Ĝia kerno estas la arigo de personoj, kiuj memstare kaj sendepende volas kune vivi kristanan vivon kun komunaj preĝoj en la tiea kapelo. Al la kristana kerno apartenas pastro – emerita misiisto, du fratulinoj de la “Nova Vojo de Sankta Francisko”, fratulino Maria Müller (kiu ankaŭ kun ni partoprenis la BT-n) kaj la organizanto de la Bibliaj Tagoj frato Stefan Lepping. La aranĝon partoprenis 26 personoj el 6 landoj: Italio, Ĉeĥio, Slovakio, Francio, Nederlando kaj Germanio.

Ĉiuj programeroj okazis en la domo, aŭ en la kapelo aŭ en la salono kaj manĝejoj. Ĉiu mateno ekde jaŭdo ĝis dimanĉo komenciĝis per rozaria preĝo, sekvis matenmanĝo. Post ĝi okazis jaŭde

unua parto de biblia prelego fare de benediktana monaĥo P. Willibald Kuhnigk OSB el Nütschau. Sekvis esperantlingva sankta meso celebrata de pastroj Bernhard Eichkorn kaj Willibald Kuhnigk el Germanio, Pierluigi Svaldi el Italio kaj Benoît Ente el Francio. Post tagmanĝo kaj posttagmeza paŭzo okazis pertrajna vizito de mezepoka urbo Soest. Tre vidinda estas la historia urbokerno kun belegaj malnovaj, antaŭ reformacio katolikaj, preĝejoj, kiujn post reformacio transprenis luteranoj. Dum Werl restis plejparte katolika urbo, la proksima urbo Soest estas plejparte evangeliana.

Post vespermanĝo sekvis en la kapelo vespro, poste en la salono kantado kaj ba-



*Kun pastro Willibald Kuhnigk mescelebras maldekstre pastro Pierluigi Svaldi el Italio kaj dekstre pastro Benoît Ente el Francio*

bilado, kaj la tago estis finita per vespera preĝo. Multe oni kantis, ĉar la aranĝanto frato Stefan ja estas profesia muzikisto. Tio multe riĉigis la programojn. Dum preĝoj, Diservoj kaj ceteraj programoj oni uzis la kant- kaj preĝ-libron Adoru.





*Vizito de mezepoka urbo Soest*

La vendreda tago denove komenciĝis per rozaria preĝo, sekvis sankta meso kaj dua parto de biblia prelego de pastro Willibald Kuhnigk. Posttagmeze antaŭ plua programo okazis en la kapelo litanio al Koro de Jesuo.

Poste sekvis vizito de Urba Muzeo kaj post ĝi vizito de tri preĝejoj. Unue oni vizitis pilgriman bazilikon de Virgulino



*Soest – enirejo en evangelianan, antaŭ reformacio origine katolikan, pilgrimpreĝejon de Virgulino Maria*

Maria, kie estas speciale honorata kruco de Jesuo kaj statuo de la Virgulino Maria kun Jesuinfano, ambaŭ pridonacantaj multajn Di-gracojn.

Post ĝi sekvis vizito de paroĥa preĝejo de sankta Walburga kaj fine la nove konstruita evangeliana preĝejo. En ĉiuj preĝejoj ni kantis, ĉar “kiu kantas, du-oble preĝas”. Post la reveno pastro Alb-recht Kronenberger okazigis prezentadon de interretaj paĝoj “Kristanaj Fontoj” ([http://](http://fontoj.net/)



*Bildo de sankta Walburga el paroĥa preĝejo en Werl, ĉiela patronino de tiu ĉi urbo*

fontoj.net/). Post vespermanĝo okazis Biblia Rondo, sekvis kantoj kun babildoj kaj tute fine kompletorio.

Sabata tago komenciĝis simile kiel la antaŭaj per la rozaria preĝo kun bibliaj meditetoj. Post matenmanĝo sekvis evangeliana Diservo, por kies efektivigo venis evangeliana pastoro el Werl. Kaj post ĝi sac. Willibald Kuhnigk realigis la trian parton de la biblia prelego. Post la prelego okazis katolika sankta meso. Sekvis tagmanĝo kun posttagmanĝa paŭzo kaj post ĝi en la kapelo ni kolektiĝis por preĝo

de Kroneto de Dia Mizerikordo. Poste ni denove iris la urbocentron, por viziti tre interesan franciskan an muzeon "Forumo de la Popoloj". Antaŭ vespermanĝo okazis preĝo laŭ ortodoksa kutimo. Nu kaj post la vespermanĝo sekvis projekcia prezentaĵo de frato Miloslav Šváček pri pasintjara 63-a IKUE-kongreso en Parizo, okazinta en centjara jubileo de fondo de IKUE en tiu urbo. Plua programo konsistis el ludoj, kantoj, babilado, en kiu oni kantis esperantlingvajn nereligiajn kantojn kaj la partoprenantoj el ĉiuj landoj kantis kantojn en sia gepatra lingvo.

La dimanĉa tago komenciĝis denove per rozaria preĝo kun bibliaj meditetoj. Post matenmanĝo sekvis matenlaŭdo en la kapelo kaj dimanĉa sankta meso kuncelebrita ankaŭ de Patro Franz, eksmisiisto loĝanta en la konvikto. Poste ankoraŭ sekvis fina rondo kun kantoj kaj per tagmanĝo finiĝis belega kaj spirite riĉa aranĝo la Bibliaj Tagoj.

Ĉar forveturo de mi kaj frato Jaroslav Chodníček okazis nokte kaj de frato Pavol Petrík el Slovakio lunde, akompane de frato Stefan Lepping povis realiĝi agrabla promeno en ĉirkaŭaĵo kaj ene de la urbo kun vizito de turka restoracio por vespermanĝo. Post la reveno kun ni kolektiĝis fratulino Maria Müller, geedza paro Hubert kaj Regina Maria Präg kaj frato Stefano, ĉiuj loĝantaj en Werl, kaj ni povis ankoraŭ babilu kaj tute fine ni kune kantis Himnon de la Katolikaj Esperantistoj "La Sinjorino de la Espero".

Post 14-hora vojaĝo ni bonorde revenis hejmen plenaj de belegaj impresoj kaj profundaj spirita travivaĵoj. Ni rekomendas al ĉiuj legantoj senhezite partopreni la venontjarajn Bibliajn Tagojn en Germanio, kies organizado transprenis sperta organizanto frato Stefan Lepping, al kiu ni tre kore dankas por la ĉi-jaraj Bibliaj Tagoj kaj antaŭĝojas nian revidon dum IKUE-renkontiĝo maje en Nitra.

*Miloslav Šváček*

## AL JUBILEULO KARA PASTRO LAJOS KÓBOR 50-jara datreveno de lia pastrigo



Kvindek jaroj de pastrigo,  
multaj zorgoj por fariĝo:  
sanktaj mesoj, baptoj, preĝo  
por anim' – al ĉiela Reĝo.

Antaŭ jaroj Di' alvokis Vin  
kaj volis: Servu ĝis vivofin'!

Vi aŭskultis voĉon Lian,  
sekvis panjan deziron,  
konsekrigis vivon vian,  
vekgigis homan miron.

Kiam malsano alvenas,  
zorgoj, maljuneco,  
kredo al Dio Vin tenas  
en la stabileco.

Sendu ĉion al la ĉielo,  
Di' transformos tion.  
Kiel glutajn de la mielo  
Vi gustumos Amon - Dion.

Ni dankas pro via am',  
pro via E-laboro,  
ni deziras ĉion bonan  
kaj vivon kiel el oro.

*Zdenka kun ceteraj*

## MAJA IKUE-RENKONTIĜO EN LA URBO NITRA, SLOVAKIO

En lasta jardeko de la pasinta jarcento ekzistis tradicio okazigi IKUE-renkontiĝojn alterne en Ĉeĥio kaj Slovakio. Lasta tiu ĉi renkontiĝo en Slovakio okazis en la jaro 2000 en la urbo Žilina. Ĉefaranĝanto de la renkontiĝoj en Slovakio estis frato Inĝ. Vladimír Němec. Post lia morto oni ne plu daŭrigis en la tradicio okazigi la IKUE-renkontiĝojn en Slovakio.



*En domo apud preĝejo de Ĉielenpreno de Virgulino Maria okazis la renkontiĝo*

Pasintjare la slovakaj IKUE-anoj partoprenis la IKUE-renkontiĝon okazintan en la urbeto Žirovnice en Ĉeĥio. Tie ekaperis ĉe ili ideo denove post 10-jara paŭzo okazigi la renkontiĝon en Slovakio. Tiucele estis elektita Misia Domo de Dipatrino en la urbo Nitra-Kalvario, kiun posedas Komunumo de Dia Vorto. La renkontiĝo okazis en semajnfinaĵ tagoj de la 27-a ĝis la 29-a de majo.

Vendrede posttagmeze la partoprenantoj atingis la Misian Domon. Per komuna vespermanĝo okazis oficiala komenco de la renkontiĝo. Post ĝi sekvis rozaria preĝo. Ekkestis belega momento, kiam dum tuta rozaria mistero „Kiu Vin, Virgulino, en la ĉielo kronis“ la sunradio tra la fenestro iluminis nur statuon de la Virgulino Maria, kiu post finpreĝo de tiu



*Mescelebras pastroj Lajos Kóbor kaj Attila Szép el Hungario*

ĉi rozaria mistero malaperis. Ĉu speciala amsigno de favoreco de la Virgulino Maria? Post la rozaria preĝo sekvis litanio de Loreto honore al Virgulino Maria – Reĝino de Majo, kaj post tio la esperantlingva sankta meso celebrata de pastroj Lajos Kóbor kaj Attila Szép alvenintaj el Hungario. La vespera programo estis dediĉita al projekciado de prezentaĵoj prilaboritaj de frato Miloslav Šváček pri lia decembra vizito de Milano kaj Bergamo en Italio, pri Bibliaj Tagoj okazintaj marte en Werl en Germanio kaj pri Vatikana Radio okaze de ĝia nunjara okdekjariĝo.



*La legaĵon legas Stefan Lepping el Germanio*





*Alparolas reprezentanto de Misiista Domo*



*Vizito en Muzeo de Misiista Domo*



*Fraton Miloš tre kortuŝis la torta eldono de Dio Benu n-ro 70*

Sabate matene post la rozaria preĝo, sankta meso kaj matenmanĝo okazis tre interesa vizito de Burgo en Nitra, ĝia Baziliko de s-ta Emeram kaj Dioceza Muzeo de Episkopejo en Nitra.

Posttagmeze okazis Konferenco de Slovakia IKUE-Sekcio kun elekto de la sekcia komitato. La prezidantino de la sekcio iĝis fratino Mária Beláňová kaj komitatanoj Mária Tomašovičová kaj Pavol Petrik. La ĝisnuna prezidantino fratino Magda Šaturová iĝis honora sekcia prezidantino.

Post tagmanĝo alparolis la ĉeestantojn reprezentanto de Misia Domo, kaj fine li invitis nin viziti tre interesan Misian Muzeon.

Poste sekvis interesa prelego de frato Inĝ. Jan Kalný „Ĉu demokratio aŭ io alia?“ kun vigla diskuto pri la aludita temo. Pro pluveto ne realiĝis planita kalvaria krucovojo ekstere, sed en la kapelo.

Post vespermanĝo ĉiuj kolektiĝis en salono, kie okazis kaŝe preparita gratulo omaĝe al mi – neindulo, okaze de mia nunjara vivjubileo. El Moravio estis alveturigita torto en formo de la sekcia revuo Dio Benu (vidu la foton sur la antaŭlasta kolora paĝo). Sekvis gratuloj kun vinboteloj el Hungario, Slovakio kaj Moravio. Verdire, mi estis tre surprizita kaj kortuŝita. Ne mankis verkita gratulpoemo (ĉi-momente en ĉeflingva versio) kaj plenpulma kantado de Nigra Madono.

Post tiu ĉi belega surpriza kaj neplanita programo ĉiuj kolektiĝis en apuda preĝejo de Ĉielenpreno de Virgulino Maria, kie okazis orgena koncerteto de frato Stefan Lepping el Germanio, profesia muzikisto, finita per kanto „Granda Di’, ni laŭdas Vin“ (Te deum laudamus). Post tio en la kapelo okazis bele-ga kantkoncerto de frato Miroslav Smyčka, kiun ĉeestis ankaŭ gastoj, vizitantoj de la tiea preĝejo. Nu kaj post ekstera mallumiĝo okazis lumprocecio al Lurda Groto kun Lurda kaj Fatima Himnoj omaĝe al nia ĉiela Patrino.



*Dankon, frato Mirek, por la bela kantado*

Ankaŭ dimanĉe matene okazis la rozaria preĝo kaj post ĝi la sankta meso kuncelebrita de ambaŭ pastroj el Hungario – Lajos kaj Attila. La ĉefcelebranto pastro Lajos Kóbor nunjare solenas gravan jubileon de sia sacerdotiĝo – la 50-jaran datrevenon.



*Mescelebro dediĉe al jubileulo Lajos Kóbor*

Tiucele estis la sankta meso celebrata. En la homilio pastro Lajos rememoris sian mirindan vojon al la pastreco ligitan kun vivoj de sia patrino.

Antaŭtagmeze unue prelegis frato Pavol Petrik pri fama historio de Nitra – agadloko de misiistoj s-taj Konstantino kaj Metodio, eksreĝa urbo, sidejo de dukoj Pribina kaj Svatopluk. Post li prelegis pri „Virgulino Maria en la Katolika Eklezio“ D-ro Štefan Grenda. Sekvis interesa diskuto kaj fermo de la belega renkontiĝo. Ni esperu, ke tiu ĉi renkontiĝo ekstartis



*Stefan Lepping kaj Ilona Bikszádi dumkante*

aŭ renovigis tradicion de la IKUE-renkontiĝoj alterne en Ĉeĥio kaj Slovakio. Koran dankon al ĉeforganizantino fratino Mária Tomašovičová kaj al ĉiuj, kiuj estis engaĝiĝintaj en la organizado de tiu ĉi aranĝo.

*Miloslav Šváček*

### **Giuliana Zavadini Caselli “Tiu mallonga tempodaŭro”**

#### **Amo kaj familio antaŭ 100 jaroj: historio vera**

Sekrete konservataj dum jardekoj de la filino kaj trovitaj nur post ŝia morto, la am-leteroj de du ge-fianĉoj de antaŭ unu jarcento aperas en ĉi tiu libro kun la akompano de priskriboj pri la familiaj kaj sociaj eventoj inter la 19a kaj la 20a jc. en Italio.

Ĝi estas historio simpla, vera, interesa atesto pri difinita epoko, kun multaj inspiroj laŭ poezia gusto. Ĉi tiu libro komence aperis en la itala lingvo, junio de 1993. La traduko en Esperanto ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke inĝ. Marcello Caselli, nepo de la du roluloj kaj edzo de la aŭtorino, estas esperantisto. La itala sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (UECI) eldonis pasintjare ĉi tiun libron kiel kontribuon de la itala katolika movado al 100-jariĝo de IKUE, ĉar ĝi prezentas socion de Romo, en kiu baldaŭ Esperanto aperos kaj kie IKUE hodiaŭ havas sian centran sidejon, sed ĉefe ĉar ĝi proponas gravajn meditojn pri amo kaj familio el katolika vidpunkto, kaj ĝi estas bone verkita.

La libro (186-paĝa) kostas 16 eŭrojn inkluzive de senkostoj al Eŭropo. Oni mendu ĝin ĉe:  
Giovanni Daminelli, Via Lombardia 37, I-20099 Sesto San Giovanni MI, Italio  
retpoŝte: giovanni.daminelli@teletu.it

## ĈU DEMOKRATIO AŬ IO ALIA?

En mia prelego mi volus unue iom super-vidi sociajn problemojn, kiuj estas kaŭzataj de politika sistemo en plejparto da landoj en Eŭropo kaj norda Ameriko, parte eĉ en aliaj landoj de la mondo. Oni indikas ĝin kiel demokratian reĝimon, do ĝi baziĝas



*Frato Ing. Jan Kalný prelegas en Nitra*

je proklamado de ĝenerala balota rajto, konkurado de politikaj partioj, parlamenta deputitara ŝtatordo, politike starigita registaro kaj sendependa juĝejsistemo. Ĉiuj civitanoj en demokratiaj ŝtatoj havas egalajn rajtojn garantiatajn laŭ Atesto de Homaj Rajtoj. Nun ni preterlasu diversajn nuancojn en unuopaj ŝtatoj, ekzemple en tiuj, kiuj havas formalan statuton de monarĥio. Ni rigardu veran situacion, al kiu venis nun homa socio, kiu glorigas demokration kiel la plej bonan kaj idealan sistemon taŭgan por la tuta terglobo. Ni scias ja, ke ekzistas ankaŭ aliaj sociordoj, funkciantaj sur tute diferencaj bazoj. Tiel ankaŭ nun en la 21-a jarcento. Ĉiutage ni aŭdas pri diversaj konfliktoj, kvereloj kaj murdoj en diversaj anguloj de nia terglobo kaŭzataj de netoleremeco kaj malamo. Politikaj metodoj kaj opinioj ofte akre kontrastas al tiuj principoj, kiujn heroldas protagonistoj de „okcidenta“ demokratio. Ekzistas ja diversaj socigrupoj, kiuj rifuzas politikan sistemon starigitan sur demokratiaj fundamentoj. Kompreneble tiuj

fontas antaŭ ĉio el rondoj malamikaj al justeco kaj digneco de aliaj homoj.

Mi parolos precipe pri kondiĉoj kaj situacioj en la Ĉeĥa Respubliko, sed ĉiuj el vi, kiuj vivas en proksimaj mezeŭropaj landoj, certe bone ekobservos, ke ekzistas multaj, tre multaj similecoj. Verŝajne vi konstatos, ke oni povas konsideri pri fenomenoj, kiuj validas ĝenerale por nia tempo eĉ socio. Eble vi rekonos multajn komunajn trajtojn, eventuale la samajn.

Ĉiuj aŭskultantoj certe konas almenaŭ iom nian historion de pasintaj jardekoj. Tamen mi memorigos kelkajn fundamentajn faktojn. Post longa periodo de totalisma komunisma sistemo ni akiris en novembro de la jaro 1989 denove libe-rerecon. Nia ŝtato, tiama Ĉeĥoslovakio, kie vivis komune ĝis fino de la jaro 1992 du nacioj – ĉeĥoj kaj slovakoj – ekpaŝis novan vojon, vojon de rekonstruata demokratio. Sed ne multaj homoj havis tiam klaran imagon, kiel tion fari. Kontinueco kun antaŭmilita eĉ mallonga postmilita tempoj de tiu politika sistemo estis de la jaro 1948 jam interrompita, do necesis preskaŭ ĉion eki de nova komenco. Mankis spertoj, mankis kapablaj gvidantoj. Tamen feliĉo por la lando nepre estis en tiu kritika momento persono de kontraŭkomunisma batalanto por homaj rajtoj Václav Havel, kiu ege merititis, ke li gvidis nin el ĉia tiama marasmo. Gravan rolon ludis en tiu situacio ankaŭ ekleziaj reprezentantoj, inter ili precipe maljuna ĉefepiskopo de Prago kardinalo František Tomášek. Sur ambaŭ flankoj – sur tiu ĉeĥa eĉ tiu slovak – elmergiĝis novaj personoj, kiuj estis komplezaj rekonstrui ruinigitan ŝtaton kaj ĝian ekonomian bazon. Ŝajnis, ke komencas post nia t.n. „velura revolucio“ ora tempo de kontenta vivo en plena libereco. Devizo de tiuj neforgeseblaj tagoj estis: „Vero kaj amo venkos super mensogo kaj malamo“. Kristanoj esperis, ke nun post tiu longdaŭra mensa dezerto de stulta materialisma ideologio certe venos epoko de kresko de spiritaj interesoj kaj de religia regeneriĝo.



Sed ho ve! Dum socialisma periodo homoj ne havis ŝancon realigi siajn kapablojn, ili povis nek entrepreni nek praktike posedi ian havaĵon. Subite ĉio ĉi entute ŝanĝiĝis. Do kio poste fakte okazis? Sapiro pri materia prospero, pri gajno de grandaj monsumoj, pri sukceso, pri kariero forĝvidis multajn homojn de idealoj, ili sin poste dediĉis plene al cititaj aferoj. Bedaŭrinde post totala historia fiasko de socialismaj ideologio kaj mastrumado oni ne instruiĝis el tiuj spertoj, sed revigliĝis alian neperfektan sistemon kapitalisman. Man-en-mane kun ĝi same eĉ ordon de politikaj partioj. Oficiale oni proklamis, ke nia ŝtato funkcias sur ne-ideologia bazo. Aperis novaj politikuloj kaj karieruloj, sekve de tio multaj kvalitaj personoj de sojla etapo post la „velura revolucio“ seniluziiĝis kaj sinsekve detenis sin el publika vivo. Niaj novaj superaj reprezentantoj starigis sur la unuan ŝtupon ekonomian sukceson, profiton kaj materian bonstaton. Do post diversaj „ismoj“ ekaperis ankaŭ en nia lando fakte nova fetiĉo, por kiu ni povus elekti trafan terminon „ekonomiismo“. Tamen kiel serioza problemo en novaj kondiĉoj ja montriĝis juraj aferoj. Niaj gravaj ministroj tial en komenca etapo, kiam ili efektiviĝis ekonomian renovigon de la ŝtato – laŭ ilia vortaro „per ŝoko“ – decidis, ke la juro fariĝus ĝia obstaklo, do tial unue oni devas rekonstrui la mastrumadon kaj nur poste oni kompilu leĝaran kadron. Sed ĉu tio estas vere interesa kaj originala antaŭeniro? La ŝoko venis, sed precipe sur aliaj kampoj.

Kompreneble post komenca ondo de entuziasmo baldaŭ malkaŝis sin rapide ankaŭ diversaj malsanoj de la socio, pre-cipe en morala sfero. Sekvoj de la detruo de ĉiuj veraĵoj valoroj elfluis iom post iom supren. Amasitaj problemoj estis kaj ĉiam estas pli multaj, ol oni antaŭvidis. Anstataŭ kreiva laboro efektiviĝas ofte fiaj praktikoj. En decidajn postenojn ne nur sur politika kampo, sed ankaŭ en ekonomikaj strukturoj enstrudiĝis homoj misuzantaj la komplikitan situacion. Tiuj rafinite riĉiĝas eĉ ofte kaŭzas bankrotojn. Oni praktikas ankaŭ kunligon de politiko

kun entreprenado, do kun „bizniso“ (pardonu al mi uzi tiun neesperantan anglan vorton, kiu tamen pli trafe priskribas jenan aferon), montriĝis eĉ adherado de politikaj agadoj kun organizata krimeco.

La nova socia situacio kaŭzis grandskalan liberigon en ĉiuj direktoj. Ne nur en ekonomia sfero, sed ankaŭ en amasmedioj, en kulturo, en religia aktiviĝo kaj aliaj. Politikaj kaj ekonomiistaj reprezentantoj neglektis moralan dimension de la vasta transformado. Unu el la ĉefaj ŝtataj altranguloj asertis, ke „nevidebla mano de merkato ĉion solvos“. Sian okazon eksentis en tiu situacio ankaŭ homoj nehonestaĵoj kaj profitavidaj. Dum la lasta periodo venis ĉeno de diversaj trompaĵoj, malsukceso de kupona privatigo, bankrotoj de bankoj kaj de multaj entreprenoj. Konekse kun tiuj eventoj aperis eĉ nova termino „tuneligo“ por firuza transŝovo de entreprena havaĵo prospere al sia propra poŝo. Fremda kapitalo enpenetris en la nacian ekonomion kun ĉiuj siaj pozitivaj, sed eĉ negativaj konsekvencoj. Al tiu stato helpis ankaŭ nesufiĉa nivelo de multaj novaj politikistoj, korupto kaj denove neperfekta leĝa sistemo.

Respondumeco, solideco, ĝentileco aŭ justeco ne plu apartenas al ĝenerale respektataj valoroj en interhomaj rilatoj. Memkompreneble tamen en la lando vivas plejparto da ordinaraj homoj, kiuj volas trankvile labori kaj vivi. Kongrue kun tio inter ili kreskas nekontenteco pri politiko kaj kurantaj vivkondiĉoj. Kelkaj sociaj grupoj suferas pro la reala situacio pli multe, ekzemple maljunuloj, handikapuloj, familioj kun infanoj kaj aliaj. Al komunumo, kiu preferas sukceson, profiton, karieron, materian bonstaton eĉ amuzon antaŭ io alia, tiaj homoj ŝajnas maloportuna balasto, kiu forĉerpas nur senutile monon.

Ni ne miru, ke ĉiam pli kaj pli da civitanoj perdas do intereson pri publika vivo, rifuzas politikon ĝenerale, sekve strebas retiriĝi nur en sian privatan helikan konkon. Spegule oni tion vidas poste dum balotadoj, kiujn partoprenas daŭre malpli kaj malpli da homoj. Multaj televidaj programoj nutras nin ofte

per diversaj sensacioj, raportoj pri perfortaj eventoj, akcidentoj. Komercaj stacioj, kies kvalito estas tre problema, direktiĝas precipe al filmoj plenaj da krimoj, sango kaj sekso krom amaso da amuzo. Valoraj enhavoĵoj ne abundas, sed bedaŭrinde intereso pri ili estas nesufiĉa. Danke al Dio ekzistas tamen ankaŭ kristana televida stacio. Mi tamen ne volas plu daŭrigi en elnombro de diversaj stigmitoj, kiuj vundigas nian socion. Pardonu, ke mi prezentis preskaŭ nur negativajn okazintaĵojn de nia lastatempa evoluo. Memstare oni povus taksu eĉ tiujn pozitivajn, kiuj ankaŭ ekzistas. Mi supozas, ke vi pri ili scias. Sed permesu al mi ekpliki, kial mi volis paroli precipe pri tiuj problemoj, kiuj turmentas ĉiujn homojn de bona volo.

Do kaj nun ni metu al ni mem gravan demandon: Kion ni kristanoj povas fari, aŭ pli bone kiel ni devas kontribui al renovigo de homa komunumo, en kiu ni vivas. Ni devas havi ĉiam niajn okulojn malfermitajn, observi signon de la nuna tempo. Tiuj, kiuj kredas je heroldaĵo de Jesuo Kristo, scias ja, ke tasko de baptitaj kristanoj estas alportadi evangelian mesaĝon en la mondon. Kiamaniere? Ĉiu kristano havas taskon fariĝi malgranda flameto en mallumo. Mi volis atentigi pri kelkaj trajtoj de vere katastrofa stato, en kiu troviĝas nun fakte eŭropa kun amerika civilizacioj. Certe ne eblas vaste priskribi en unu mallonga prelego multajn aspektojn de ĉi tiu temo. Grave estus menciigi ankaŭ problemajn interligojn kun aliaj civilizaciaj fluoj, sed tio estus jam temo por plua pripensado. Tamen nun sufiĉas nur la tuŝitaj faktoj.

Sed mi revenos al niaj taskoj, al nia persona respondecado, ĉar ĉiu el ni kreas eron de la tuto. Ni devas komenci mem ĉe la propra persono. Neniu el ni povas ja ŝanĝi la mondon, sed min jes. Do ne prokrastu! Ĉiu el ni havas de Dio difinitan propran taskon. Iu en la familio, iu en publika vivo, iu eble en supera politiko. Samtempa malsana postkristanisma socio, kiu vaste forlasis siajn spiritalajn radikojn, nepre bezonas kuracadon. Ĝi havas praktike nur du ŝancojn: aŭ daŭrigi en tendenco de materia bonvivantismo, senmorala relativ-

ismo eĉ mensa malpleno kaj tiel direktiĝi al sia nedeturnebla memdetruo aŭ rekoni donitajn religiajn principojn kaj moralan ordon kun konstruo de la socia sistemo sur tiuj bazoj, do poste direkti sin al nova reviviĝo.

Sed kia estas tamen konkludo el tio ĉio, kion mi en mia prelegeto trajte skizis? Ne sufiĉas ja nur konstati, kia estas la realo. Sen serĉado de elirpunktoj ne estus la tuta afero utila. Ni provu rigardi nun la problemaron de demokratia politika sistemo iom ĝenerale, ne nur el la vidpunkto ĉeĥa. Evidente ni vidas, ke regado pere de politikaj partioj signifas ŝancojn precipe por homoj povosopirantaj, rapide pensantaj eĉ lerte parolantaj, do alivorte jen ekzistas danĝero de demagogio kaj misuzo de demokratiaj principoj. Bedaŭrinde mankas ĉi tie postuloj je moralaj kvalitoj kaj fakaj spertoj de potencaj gvidantoj. Do sekve povas regi ankaŭ diversaj parolemuloj eĉ fuŝuloj. Novepoka historio tion jam multfoje dolorplene pruvis. La partia demokratio en landoj sen kvalita bazo poste bone ne funkcias, ĉar tiun sistemon misuzas diversaj profitemuloj kaj fiuloj je siaj propraj interesoj.

Verŝajne ne multaj kristanoj scias pri evento, kiam la karmemora beata papo Johano Paŭlo la II-a elvokis homojn ĉe sojlo de la 3-a jarmilo pri kreo de nova socia ordo, pri pli konvena, pli saĝa kaj justa politika sistemo. Ĉu ni aŭskultis lian voĉon? Certe tia socia ordo povus ekzisti, nur estas necese krei ĝin firme sur principoj de evangelio. Ni ne forgesu, ke konstruo de ia ajn komunumo estos daŭre prospera nur, se ĝi ĝuos Dian benon. La 15-a ĉapitro de la Evangelio laŭ Johano tion tute klare eksplikas. Se la estonteco povus fariĝi pli bona, do tion devus garantii tial antaŭ ĉio kvalita spiri-ta bazo. Ni rememoru, ke Jesuo Kristo, filo de Dio diris pri si mem (Joh. 14,6): „Mi estas vojo, vero kaj vivo“ kaj pri ni, kristanoj (Mt 5, 13-14): „Vi estas la salo eĉ la lumo de la mondo“. Sur kvalita fundamento oni povas starigi poste eĉ pli bonan socian ordon. Nu, instigojn kaj direktivojn ni havas, ne timu ekpaŝi.

Dio nin benu!

*Inĝ. Jan Kalný, Ĉeĥio  
(Prelego prezentita en Nitra en majo 2011)*

## Ni funebras kaj kondolencas

En junio 2011 nia movado estis malfeliĝigita de la forpasoj de 3 gefratoj

### Krystyna MACIŃSKA

Ŝi estis fakulino pri biblioteka temaro: en decembro 1951 ŝi estis dungita en la publika biblioteko, kaj havis rimarkindan karieron en la postaj jaroj kiel diplomita konservistino, longe laboranta en Distrikta kaj Urba-Publikaj Bibliotekoj en Lodzo kaj en aliaj institucioj, ankaŭ kun gvidantaj taskoj. Eble al tio kondukis ŝin ŝia feliĉa infanaĝo (unika filino de gepatroj, naskita la 23-an de decembro 1924) meze de la amaso da libroj en la hejma biblioteko. De la 1-a de majo 1965 ĝis sia emeritiĝo en 1983 ŝi estis la direktorino de la Muzika Akademia Biblioteko en Lodzo. Ŝi estis aktiva esperantistino kaj aŭtorino de la E-bibliografio pri Beata Johano Paŭlo la 2a. Ŝi



verkis multajn prozaĵojn, rememoraĵojn kaj versaĵojn, instruis E-on. En la lastaj jaroj ŝi kuŝis dum longa tempo en la hospitalo sed ŝi elmontris sin nekredible kuraĝa, kiam oni devis solvi la problemojn, kiujn alportis la vivo. Ŝia maldika, iomete kurbiĝinta figuro kun tipa ĉapelo sur la kapo estis tre karakteriza. Ŝi mortis la 9-an de junio 2011 en Lodzo kaj la 15-an de junio okazis la funebra ceremonio kaj entombigo en la Malnova Tombejo. (fotografia portreto el [www.breviero.org](http://www.breviero.org))



### Pastro Roman FORYCKI

Pro stratakcidento ĉe Mostowo proksime de Koszalin, apud Varsovio, li forpasis la 25-an de junio 2011, ne multajn tagojn post la soleno de la 50-a datreveno de sia pastrigo. Li naskiĝis la 9-an de aŭgusto 1936, en urbeto Wilceblota, en la distrikto de Kościerzyna (Warszawa). En 1954 li komencis sian novicadon ĉe la Palotinoj en Ząbkowice Śląskie. En Ołtarzew (proksime al Ożarów Mazowiecki) li studis filozofion (1955-57) kaj teologion (1957-61) kaj pastrigis la 4-an de junio 1961. Pro liaj brilaj intelektaj kapabloj, de la komenco oni instigis lin daŭrigi studadon, esploralaborojn kaj instruadon. Li akiris majstrecon pri filozofio ĉe la Katolika Universitato de Lublin (1965). En la Akademio de Katolika Teologio en Varsovio li lekciiis pri filozofio de religio. Li doktoriĝis en 1972 kaj samjare ekgvidis la Apostolan Instituton en Ołtarzew. De 1978 ĝis 1984 li estis rektoro de la Seminario en Ołtarzew. En 1993 P. Forycki fariĝis rektoro de la granda seminario de diocezo Elk ĝis 2002. Aldone al tiu tasko, li estis direktoro de la Departemento por Religiaj Aferoj de la sama diocezo. Fininte sian laboron en Elk, li revenis al Ołtarzew, kie li lekciiis pri filozofio kaj estis ankaŭ spirita asistanto de la studentoj. Dum la jaroj, laŭ la petoj de superuloj ne nur de la palotina ordeno, li aktive partoprenis en la laboro de pluraj komitatoj, sekretariejoj kaj fakaj grupoj kaj ofte ricevis invitojn por partopreni kiel fakulo kaj preleganto en multegaj aranĝoj. Li estis ankaŭ ege kreiva aŭtoro de artikoloj, recenzoj, studoj: proksimume 430 diversaj eldonaĵoj. En la katolika E-movado li estis estrarano de IKUE, membro de la Komisiono starigita (laŭ invito de la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto) por revizii la liturgiajn tekstojn en Esperanto, partoprenanto kaj preleganto de multaj IKUE- kaj ekumenaj Kongresoj. En la funebra ceremonio ĉe lia entombigo en Ołtarzew partoprenis ankaŭ geesperantistoj, venintaj el diversaj regionoj de Pollando.


En YouTube filmoj memorigas lin: [http://www.youtube.com/watch?v=o2f\\_n1rCKYQ](http://www.youtube.com/watch?v=o2f_n1rCKYQ)  
<http://www.youtube.com/watch?v=pcu4DiuWhio>



## FORPISIS NELACIGEBLA FRATO JACQUES TUINDER

*Jam la 19-an de junio atingis la esperantistaron en la tuta mondo la malĝoja sciigo, ke en la nokto inter la 18-a kaj 19-a de junio pro kor-atako, post tridek minuta dolorplena agonio, mortis en la brakoj de sia edzino karega frato Jacques Tuinder.*

Jacques estas lia voknomo, plene li nomiĝas Jacobus Antonius. Li naskiĝis la 10.01.1933 en Hago. Liaj gepatroj estis benitaj per ne malpli ol 10 infanoj. Li studis teologion kaj sociologion kaj iom antaŭ la elekto al prezidanteco, la tiam 33-jaraĝa Jacques estis ĵus fininta siajn studojn kaj laboris en la sociala fako de sia diocezo. En 1951 li konatiĝis kun Esperanto per artikolo pri la katolika E-movado en eklezia gazeto. Aŭtodidakte li lernis la lingvon. Dum la jaroj 1957/58 li redaktis la rubrikon „Tra la katolika mondo“ en *Espero Katolika*, poste dum la jaroj 1959 kaj 1960 li redaktis internacian gazeton „Birdo“-n de la junulargrupo de IKUE. En 1962/63 li estis prezidanto de „Nederlanda Katoliko“ kaj redaktis ties organon. Li edziĝis al esperantistino, fleĝistino kaj lia kursanino Vera, kiun li renkontis la unuan fojon dum la UK en Varsovio (1959). Ili havis 3 filojn. Elektita li estis prezidanto dum la IKUE-kongreso 1966 en St. Gallen. Li ĉiam fervore engaĝiĝis por ekumenismo kaj entuziasme organizis kune kun Stefan Maul, la tiama redaktoro de *Espero Katolika*, kaj Adolf Burkhardt, la tiama prezidanto de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia), la Unuan Komunan Kongreson okazintan de IKUE kaj KELI de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1968 en Limburg/Lahn, Germanio, kun la partopreno de 200 esperantistoj, membroj de la du kristanaj asocioj el 18 landoj. Ĝi estis la unua el tiuj, kiujn oni nun nomas Ekumenaj E-Kongresoj. En la balotoj de IKUE 1971 li ne estis reelektita. Kiel progresema katoliko, kiu ĉiam sentis sin



*Por multaj estis lasta renkontiĝo kun frato Jacques dum la 19-a Ekumena E-Kongreso en Vroclavo, Pollando, en la jaro 2009*


unuavice kristano kaj ne ano de iu specifa konfeso, li transprenis la prezidantecon de la ĉefe protestanta asocio KELI de la jaro 2000 ĝis 2004. Dum multaj jaroj li streĉe sin dediĉis al bonfaraj agadoj. Tre fama iĝis lia porblindula agado komencita en 1966, konata sub la nomo Agado E 3 – Esperantistoj esperigas Esperantojn, aŭ poste E-vid-ente, daŭranta ĝis lia morto. La blindula asocio LIBE elektis lin honora membro, Esperanto Nederland aljuĝis al li la premion Verloren van Themaat kaj la nederlanda reĝino kavalerigis lin en la Ordeno de Oranje Nassau.

Li vivis en Heemskerk kun sia edzino Vera Tuinder Dekker, daŭrigante intensan agadon favore al vid-handikapitoj ĝis sia morto.

*Fonto: Interretaj paĝoj de IKUE kaj Vikipedio*

## BONFARAJ AKTIVADOJ E3 KAJ EVIDENTE DE FRATO JACQUES TUINDER

Jacobus Antonius Tuinder naskiĝis antaŭ 79 jaroj (10.01.1933) en Hago. Profesie li fariĝis “sociala laboranto”, praktike akompananto de socimarĝenuloj (en prizono, poste en psikiatriejo). Sian edzinon li renkontis en la jubilea Universala Kongreso en Varsovio, 1959. Naskiĝis al ili tri filoj: Flip, Jef kaj Bart. Ĉi lasta ne eltenis la vivon, kio afliktis la gepatrojn. Unu el la nepoj ricevis lian nomon. Evidente pro respekto.



En la movado li konatiĝis ĉefe inter kristanoj kaj pro sia empatia laboregado por vidhandikapitoj. Humanan helpon li donis ekz. al la blinda Nora Reinders-Bartels, kiu post la perdo de sia sola filo restis sencela. Kune kun Paul van den Berg, la prezidanto de Nosobe, li persvadis ŝin instrui ilin pri Esperanto. Tio jam savis unu vivon. Pli simple: vizitanto ofte trovis lin sindediĉe enpakanta brajlan paperon, kaŝdonacojn, eĉ tutajn aparatojn por la plej senhavaj samideanoj, interalie en Albanio, Rumanio, (eks)Sovetio. Kaj

neniam li eĉ pensis pri la eblo malakcepti gaston. Lia varma voĉo invitis – malgraŭ la laboro multhora – “Bonvolu enveni!”

Preskaŭ 45 jarojn, ekde novembro 1966 Jacques Tuinder provis mildigi la sorton de vidhandikapitoj vivantaj en la plej mizeraj cirkonstancoj. Komence lin alarmis informo, ke milionoj da afrikanoj, t.e. tri el kvar blinduloj, suferas nenecese, interalie pro la rivermalsano. Ĉar Zamenhof po unu tago semajne sin dediĉis al nepagipovaj vidhandikapuloj, Jacques varbis precipe inter “nia diligenta kolegaro”: “Esperantistoj, esperigu esperantojn!” (Agado E3). Konserviĝis la triobla E en la posta fondaĵo “Evidente” – “Zienderogen”. Jam delonge necesis kunlabori ankaŭ kun aliaj instancoj.

Komence rezultis du veturantaj okul-klinikoj („Zamenhof“ kaj „Esperanto“) en Kenjo kaj Malavio kaj okulhospitalo en Kameruno. Aldoniĝis kampanjoj en Azio: A-vitamin-projekto por vjetnamaj infanoj, blindullernejo en Srilanko, li mem aliris Duŝanbe, la ĉefurbon de Taĝikio, kie blinda samideano lin kontaktigis kun la malriĉega blindulejo. Ĝenerale Jacques estis invitata de la instancoj pere de lokaj esperantistoj, oftakaze mem blindaj.

En Eŭropo ne malpli mizeras vidhandikapitoj en Albanio, Moldavio, Rumanio, Ukrainio kaj Rusio. Por ne konkurenci kontraŭ lokaj optikistoj, li ĉie okupiĝis ekskluzive pri la plej malriĉaj vidhandikapitoj, interalie en prizonoj (Rusio), en Rumanio inter ciganoj vivantaj sur rubmontoj, el kiuj ili serĉas ankoraŭ utiligeblajn materialojn. Sed ankaŭ blindullernejojn li provizis per la plej esencaj materialoj (brajla presilo, papero, brajlomaŝinoj ktp.).

Pensiite, Jacques plu deĵoris en la mo-

naĥejo de Bergen (N.-H), kie li antaŭe helpis rifuĝintojn fari kandelojn. Poste kiel unu/dutaga pedelo li trovis tempon por ampleksa brajla korespondado. En la Nosobe-semajnfinoj la partoprenantoj de lia dimanĉmatena meditado ricevis eĉ la tutan tekston bele brajlita, por povi viclegi mozaike. Helpadis tie, samkiel hejme, ankaŭ lia edzino Vera. Kvankam li mem pagis ĉiujn kostojn, li komencis pli vojaĝi, eĉ al Afriko. Rezultis „adoptado” (regula subtenado) de pluraj vidhandikapitaj infanoj: 11 en Kongo, po 2 en Maroko kaj Rumanio, 3 en Maŭritanio, “kaj multaj ankoraŭ atendas”, li skribis en unu el siaj

lastaj raportoj kun evidenta bedaŭro, ke ne eblas forigi la tiean mizeron.

Lacega li revenis el Tanzanio, kaj lia koro ĉesis bati en la vendreda nokto, la 18-an de junio. La funebra karto alvokis rezigni pri floroj kaj anstataŭ tio kontribui al Evidente! La funebran Diservon kaj la kremacian solenon ĉeestis ĉirkaŭ 250 personoj. Parolis reprezentanto de „Evidente”, s-ino Hoobroeckx, psikologo-kolegino de Jacques, kaj nome de Esperanto Nederland la prezidanto Gerrit Berveling.

*Trasprenita kaj iom mallongigita el la interreta teksto de Rob Moerbeek*

## MIAJ REMEMOROJ PRI FRATO JACQUES TUINDER

Kun frato Jacques mi interkonatiĝis en la jaro 1968 dum la Unua Komuna Kongreso de IKUE kaj KELI en germana urbo Limburg/Lahn. Tiam dum la kongreso mi loĝis kun mia edzino en familio de tiama redaktoro de Espero Katolika Stefan Maul, kiu estis la ĉefaranĝanto de la kongreso. Ĉiuvespere en lia loĝejo kolektiĝis



ĉefuloj de ambaŭ organizaĵoj, por amikeca interbabilado ĝis malfruaj noktaj horoj. Tio unuaflanke kaŭzis nesufiĉan dormon, sed duaflanke estis do ebleco bone interkonatiĝi kun gravuloj de la ambaŭ organizaĵoj, precipe kun tiama prezidanto de IKUE frato Jacques Tuinder kaj la prezidanto de KELI pastoro Adolf Burkhardt. Kun ambaŭ mi restis en bona amikeca kontakto ĝis ilia forpaso. Frato Jacques kun sia edzino Vera kelkfoje dum komunista periodo vizitis nian landon – tiaman Ĉeĥoslovakion. Malgraŭ niaj principo diferencaj starpunktoj rilate al la katolika eklezio, neniam ekestis inter ni iu disharmonio. Ankaŭ li kun edzino estis vizite en nia vilaĝa hejmo.

Post falo de fera kurteno mi povis en la jaro 1990 perŝipe viziti kelkajn landojn de la Eŭropo, inter ili ankaŭ estis Nederlando. Tiam frato Jacques venis al Amsterdamo, por min veturigi al sia hejmo en Heemskerk. Tie venis al li ideo, ke ni povus per du-persona biciklo viziti marbordon. Volonte mi konsentis. Veturante perbicikle mi sidis la dua post frato Jacques. Mi tiam ne estis alkutimita bicikladi, tamen mi strebis per biciklado ne kaŭzi ĝenon al la kara frato. Mi sukcesis, sed dum kelkaj tagoj poste ĉesido mi vole nevole estis rememorigata pri tiu ĉi nia perbicikla ekskurso al la marbordo.

Nun estas necese esperi, ke bona Dio rekompencis la fraton Jacques per la ĉiela feliĉeco pro lia longjara bonfarado prospere al la vidhandikapuloj, en kiuj li ĉiam vidis helpon al Kristo mem.

*Miloslav Švábek, prezid. de IKUE*

*Ripozon eternan donu al niaj gefratoj, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al ili, ilĝi ripozu en paco. Amen.*